

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 13/08/2020 Kvarcentnaŭdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **731,640** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **284,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **229,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **7,640** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde oktobro 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.” N.ro. 133



Kiam la vorto estas verbo, kion indikas la neŭtrala finaĵo “-i”, ĝi povas anstataŭe havi unu el la finaĵoj “-as, -is, -os, -u, aŭ –us”, tio signifas ne nur ke la vorto estas verbo, sed donas plian informon pri la vorto, nome la nunan tempon, la pasintan tempon, la estontan tempon, la volitivan, kaj la kondicionalon. Ĉe ĉi tiuj finaĵoj oni do ne bezonas ekstre aldoni la finaĵon “-i”. Ĉi tiuj vortoj estas verboj, ne nur agvortoj, kaj la agvorto aŭ verbo havas ses malsamajn finaĵojn montrantajn ke la vorto estas agvorto. (daŭrigota). **Marcel Leereveld.**




Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Roger Springer



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)



Sekretoj gramatikaj kaj aliaj.

ALIAJ SEKRETOJ .

Ni timas, ĉar la ĉefministro rajtas deklari militojn. Sed se la leĝo rilata tion ŝanĝatos, la problemo tamen ne ŝanĝatos. Ĉar la instancoj kiuj konsilas pri tio al la ĉefministro, plu konsilos lin aŭ ŝin kaj aliajn registaranojn, aŭ eĉ pli malpli devigas ilin pri milito.

Aŭstralio ja havas du (krom la militistajn) sekretajn servojn kiuj pli aŭ malpli povas agi sendepende de la registaro, nome A.S.I.O. kaj A.S.I.S. Ilia laboro estas ne nur spioni sekrete, sed ankaŭ decidi pri siaj konsiloj al la registaro. Ili havas preskaŭ plenan potencon en la ŝtato. A.S.I.O. precipe zorgas pri la spionado enlanda, kaj scias aŭ kapablas scii ĉion pri mi kaj pri vi. Kaj proponas agi kontraŭ mi kaj vi se ĝi trovas tion necesa. A.S.I.S. precipe spionas eksterlande, por scii ĉion pri ĉiu lando kion ĝi trovas necesa scii, por la intereso de Aŭstralio kaj la aŭstralianoj. Kaj ili ne bezonas malsekretigi ion ajn al la popolo. Ili estas kaj agas tiom sekretaj ke ni scias nenion pri ilia agado.



Oni povas opinii, ke tio estas necesa aŭ nenecesa, sed la fakto ke ĉiuj landoj havas tiajn sekretajn servojn necesigas ke ankaŭ Aŭstralio havas ilin. Do tio estas necese bona, sed kio estas ne bona, ke ili povas influi la registaron agi laŭ siaj konsiloj. Sed ĉar ili neniam bezonas publikigi siajn laborojn, ni neniam ekscias ĉu ili influas ĝuste aŭ malĝuste, por nia intereso. Ilia agado restas ĉiam, jes ĉiam, sekreta, escepte se la registaro funkciigas t.n. Reĝan Komisionon. Kaj eĉ tiam ili havas la rajton rifuzi certajn informojn. Pri iliaj konsiloj al la registaro ni povas diveni nur el la agoj de la ĉefministro. Tia Komisiono okazis en 1977, kiu konkludis, ke ASIS faris gravajn erarojn. Post tio, ĝis nun, ambaŭ sekretaj servoj agis pli bone kaj pli malkritikeble. Ni povas nur diveni, ne scii, ĉu ili havis decidan rolon en la militoj en Vjetnamujo kaj Irako, en la malfunkciigo de Whitlam, en la traktado ante al Ĉinujo, kaj en multaj aliaj aferoj. Ili povas havi tiom da potenco, ke ekzemple la franca sekreta polico decidis mortigi viron en Njuzelando, sen puno. Mi kaj vi tamen ne povas diri, ke ni ne bezonas tiujn sekretajn servojn. Neniu aŭstralia registaro kuraĝus forĵeti ilin. Ĝuste aŭ ne, multaj aliaj landoj havas siajn sekretajn servojn en Aŭstralio, por spioni sur nin. Plej multe eble Ĉinujo, ĉar ĝi estas granda lando.

Pri la antaŭaj gravaj miskondutoj de A.S.I.S aperis artikolo de Brian Toohey en la gazeto "The National Times" de Marto 15 ĝis 21 1981. Neniu rajtas publikigi kion nun faras la sekretaj servoj, sed plej multaj faktoj tiratis de Toohey el la raportoj de la 1977-a Reĝa Komisiono gvidata de Justice Hope. El tio sciigis, ke ASIS havas, nur por sia laboro de subaĉetado, buĝeton de \$800,000 (en 1977). Kape de la raporto de Toohey la gazeto deklaris, ke la raporto pritraktas la historion de ASIS kaj ne detaligas nunajn operaciojn nek la lokojn de sia aktivado kaj ĝi neke identigas iujn ajn agentojn aŭ oficistojn de ASIS escepte de la nuna kaj antaŭaj direktoroj..

Ĉar la artikolo de Brian Toohey estas tre longa (sur paĝoj 10 kaj 11 kaj 12) mi tradukis por A.E. nur la enkondukon al ĝi faritan de la gazeto. Jen ĝi estas:

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

“ La National Times malkaŝas por la unua fojo la historion de la aŭstralia C.I.A., la Aŭstralia Sekreta “Spionado-Servo. ASIS estas la fremdlanda spionforto. Ĝi kolektas informojn en aliaj landoj kaj “havas la kapablon fari kaŝitajn aktivadojn. Dum multaj jaroj oni neigis la ekziston de ASIS La “aŭstralia registaro neniam revelaciis detalojn pri ĝiaj operacioj. Nun, sekve al larĝaj intervjuoj kaj “post aliro al registraĵoj de la Registaro, inkluzive de nepublikigitaj partoj de la Reĝa Komisiono de “Hope pri spionado, The National Times povas rakonti la plenan historion. En ĉi tiu raporto, Brian “Toohey montras kiel ASIS:



- “ Perdis ĉiujn siajn agentojn en Vjetnamujo kaj Kamboĝo;
- “ Ne povis trovi sian agenton en Orienttimoro por eksigi lin;
- “ Ne sciis ke ĝi helpis eksigi la registaron de Salvadore Allende;
- “ Komplotis programon de malstabiligado kontraŭ la Indonezio de Sukarno;
- “ Eksigis du el siaj direktoroj; kaj
- “ Estis mem fermita dum mallonga tempo sed indulgata post interveno de la registaroj de Usono “kaj Britujo.

“ The National Times raportas detale la rekomendojn de Justice Hope por la estonteco de ASIS. Li “rekomendis ke ASIS:

- “ Malfermu novajn staciojn;
- “ Spionu fremdajn ambasadorejojn en Aŭstralio;
- “ Faru pli grandan uzon de registaraj departamentoj por “kovri sin”; kaj
- “ Enfiltrigu la KGB. “

Raportita de **Marcel Leereveld.**

P. S. Ni do ne scias ĉu ASIS konvinkos la ĉefministron fari militon kontraŭ Ĉinujo, nek fari kun Ĉinujo militon kontraŭ Rusujo, nek malhelpi la ŝanĝon de reĝlando al respubliko, nek helpi Singaporon resti sendependa. **M. L.**

GRAMATIKAJ SEKRETOJ .

Ĉu la eŭropaj Esperantistoj scias:

ke la Pasiva Voĉo devas havi la saman verbtempon kiel ĝia Aktiva Voĉo? Ekzemple:
(en ĉiuj ĉisubaj frazoj mi manĝas la kukon je la dua horo)

AKTIVA > Nun estas la dua horo. Mi nun manĝAS/estAS manĝANTA la kukon.

PASIVA > La kuko nun de mi manĝatAS/estAS manĝATA.

PREZENC/O/IMPERFEKTO.

Je la tria horo mi diras ke mi manĝis je la dua horo jene:

AKTIVA > Mi manĝIS/estIS manĝANTA la kukon jam.

PRETERITO/IMPERFEKTO.

PASIVA > La kuko manĝatIS/estIS manĝATA de mi antaŭ horo.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Je la unua horo mi diras ke mi manĝos je la dua horo jene:

AKTIVA > Mi manĝOS/estOS manĝANTA la kukon post unu horo.

FUTURO/IMPERFEKTO.

PASIVA > La kuko manĝatOS/estOS manĝATA de mi post unu horo.

Je la tria horo mi sentas la stomakon tute plena,

ĉar je tiu horo mi estAS manĝINTA la kukon jam pli frue.

PERFEKTO AKTIVA.

Je la tria horo la kuko ne plu ekzistas,

ĉar tiam la kuko estAS manĝITA unu horon antaŭe.

PERFEKTO PASIVA.

Je la unua horo mi sentas la stomakon malplena,

ĉar tiam mi estAS ankoraŭ ne manĝINTA la kukon.

PERFEKTO AKTIVA.

Je la unua horo la kuko ankoraŭ ekzistas,

ĉar je tiu horo la kuko estAS ankoraŭ ne manĝITA.

PERFEKTO PASIVA.

Je la unua horo mi sentas la stomakon malplena,

ĉar tiam mi estAS ankoraŭ manĝONTA la kukon poste.

PREDIKTO AKTIVA.

Je la unua horo la kuko ankoraŭ ekzistas,

ĉar ĝi tiam ankoraŭ estAS manĝOTA poste.

PREDIKTO PASIVA.

Je la tria horo mi sentas la stomakon tute plena,

ĉar tiam mi ne plu estAS manĝONTA la kukon.

PREDIKTO AKTIVA.

Je la tria horo la kuko ne plu ekzistas,

ĉar ĝi tiam estAS ne plu manĝONTA.

PREDIKTO PASIVA.

Se oni uzas ekz. “La kuko estIS manĝITA, tio NE signifas “Mi manĝis la kukon”.

La ekzemploj estas pli komplikaj, se oni uzas “estIS” kaj “estOS”. La hindeŭropa kaj Zamenhofa inteligentoj deziris imagi ĉiujn tiajn bildojn en la lingvo. En la ĉiutaga Esperanto ni, nenecese, uzas nur kelkajn tiajn komplikajn frazojn. Nenecese, se oni uzas la unuverban Pasivan Voĉon (manĝati).

Marcel Leereveld.



Estrarkunveno 2020-08-06



Partoprenis: Sandor, Jonathan, Heather, Terry, Bradley

(1) NIA VENONTA SOMERKURSARO EN JANUARO 2021

Ni daŭrigis la diskuton, ĉu havi realan aŭ virtualan aŭ hibridan kongreson en januaro 2021. Ni devas findecidi je la fino de oktobro.

Diru al ni kion vi pensas.

(2) REGULAJ MONATAJ ZOOM PREZENTADOJ

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

La venonta okazos dimanĉon, la 16-an de aŭgusto (inter la 16:00 – 18:00 Sidneja tempo)

La du prezentantoj estos:

Anna Löwenstein (Britio): Kenwood House: historia domo en norda Londono

Trevor Steele (Aŭstralio): Historiaj pandemioj kaj la sekvoj

Konsideru serioze partopreni.

(3) MONDA VIRTUALA FESTIVALO

La UK estis nuligita > Partoprenu la mondafeston kiu okazas NUN.

<https://mondafest.net/>

(4) MEMORIGO PRI LA NUNAJ VIRTUALAJ KUNVENOJ

La listo de nunaj Esperanto virtualaj kunvenoj en Aŭstralio.

Brisbano: Ĉiun duan sabaton, je la 14:00-a (kontakto: maquinacionescreativas@gmail.com)

Sidenejo: Sabate, 18:00 -20:00

Melburno: Dimanĉe, 19:00 – 19:40 (MeetUp)

Adelajdo: Dimanĉe, je 14:00 (Meet Up), (14:30 en Sidnejo, Melburno)

Ĉiun unuan merkredon de la monato, je la 19:00-a (19:30 Sidnejo)

Bv partopreni kaj kontribui.

Se vi scias aŭ eble eĉ mem organizas virtualajn kunvenojn informu nin.

Venonta kunveno: jaŭdo 20-a de aŭgusto 2020.

Plej amike, **Sandor Horvath**



Prelegserio per Zoom daŭras

Kiel menciite (AE-485), Aŭstralia Esperanto-Asocio organizis virtualan prelegserion la 3-an dimanĉon de ĉiu monato, inter la 4-a kaj la 6-a ptm laŭ Sidneja tempo (06:00–8:00 UTC).

La serio daŭros ĉi-dimanĉe, la **16-an de aŭgusto 2020** per du prelegoj:

- **Historiaj pandemioj kaj la sekvoj** – Trevor Steele (Aŭstralio)



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

• **Kenwood House: historia domego en norda Londono** – Anna Löwenstein (Britio). Anna estas volontulo (en pli feliĉaj tempoj) ĉe Kenwood House en norda Londono. Tiu bela domego estas nun plena je elstaraj artaĵoj el la 17a ĝis 19a jarcentoj. Anna montros kelkajn el la plej gravaj pentraĵoj, kaj rakontos iujn neatenditajn faktojn pri la homoj, kiuj loĝis tie antaŭ 250 jaroj.



Por partopreni (aŭ se vi mem volus prezenti ion en estonta sesio) sendu mesaĝon al: prezidanto@esperanto.org.au. Vi ricevos la ligilon la tagon antaŭ la evento.

Pli da informo: aea.esperanto.org.au/eo/prelegserio-zoom-2020

Fotoj: Trevor Steele kaj Anna Löwenstein

sendis **Jonathan Cooper**



Sendis **Petro Danzer**



Foto de la Brizbana Esperanto-Biblioteko



Kial la Homaro nun aĉetas armilojn anstataŭ uzi tiun monon por helpi siajn popolojn?? **Roger Springer**



3ZZZ Kiel atendite en la elsendo de la 10 a de aŭgusto eblas aŭdi la duan parton de la prelego de Paul Peeraerts pri la revuo *Monato*. Sciu ke la stato de la planedo estus tute alia se la inventaĵoj de Aŭgustin Mouchot estus akceptitaj. La programo informas la aŭskultantojn ankaŭ pri kion malkaŝas haroj.



Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE